# La Riverego

Printempo de 2000 — Esperanto-Societo Kebekia — N^ro^ 58^a^, Jaro 15^a^


# Ek al la ret'!

Jessy LaPointe

La Esperanto-Societo Kebekia havas novan retan paĝaron! Vi povas vidi ĝin ĉe la adreso:

http://www3.sympatico.ca/esperanto

kaj lerni pli pri Esperanto kaj pri la Lingvo Internacia en Kebekio.

Sed unue, mi skribu pri la diskutoj okazintaj inter la estraranoj de la Esperanto-Societo Kebekia, ĉar la problemo de la reto stariĝas fronte al ni pli kaj pli serioze.

Ĉiusemajne eklernas vi, ke unu el viaj malnovaj amikoj, maljunaj onklinoj aŭ malproksimaj kunlaborantoj komencis uzi la retpoŝton aŭ aperigis sian personan retpaĝaron. Eĉ eblas, ke via estro petis vin ŝanĝi partojn de via laboro por ebligi, ke via firmao aperu mondskale (mi apartenas al tiu kategorio).

En tiu situacio, tute ne estas eksterordinare, ke ankaŭ la diversaj Esperanto-asocioj tra la mondo komencas pripensi sian estontecon tra la prismo de la reto. Ni povis vidi, dum la lastaj monatoj, multajn asociojn finpretigi pli kaj pli ampleksajn kaj belaspektajn paĝarojn (UEA, ELNA, ktp).

La celo de tiu movo estas kompreneble la informadon de la esperantistaro, sed ankaŭ la disvastigo de la Lingvo Internacia: la premo de multaj lingvanaroj (hebrelingvanoj, arablingvanoj, ktp) igis ke la reto ne plu estas la regejo de la angla. Fakte, eĉ esperantistoj povas produkti (kun la supersignoj, dankon!) belaspektajn paĝarojn, ofertante al la movado senliman eblecon efike prezentiĝi sur la reto kaj "vendi" Esperanton.

> Tute ne estas eksterordinare, ke ankaŭ la diversaj Esperanto-asocioj tra la mondo komencas pripensi sian estontecon tra la prismo de la reto.

Kompreneble, nia Esperanto-Societo Kebekia devis adaptiĝi al la movado. La plej grava demando estis: *"Ĉu indas daŭrigi la aktivaĵojn de la Societo, kiam la membraro malkreskas senĉese kaj sufiĉas al pli kaj pli da homoj iri sur la reto por esti instruitaj pri la situacio de la lingvo en la mondo, babili kun aliaj samideanoj aŭ lerni Esperanton?"*

Vi povis vidi, en la lasta eldono de *La Riverego*, ke la Societo serioze pripensis la eblecon "fermi la pordon" kaj lasi la reton plenumi la rolon kiun estis tiu de la ESK-uloj antaŭ ne malproksima tempo.

Sed la diskutoj pri la temo permesis, ke la membroj de la estraro de la Societo pli bone difinu ĝiajn ĉefajn celojn: permesi la korpajn renkontiĝojn de la membraro kaj disvastigi Esperanton en Kebekio.

Pro tio, la reto utilas, sed ĝi restas nur plia ilo. Ĝi ne povas anstataŭi la agadon de ESK.

Unue. Konsiderante, ke ne ĉiuj havas aliron al la reto, ESK devas plu informi ĉiujn pri la aktivaĵoj partopreneblaj en Kebekio kaj en la mondo ne nur per la reto, sed ankaŭ per la eldonado de *La Riverego* sur papero.

Pri tio permesu al mi, ke mi citu la vortojn de Kalle Kniivilä, en la revuo *Esperanto* de februaro 2000 (Tiel ke vi povu vidi, ke ne nur en Kebekio tiuj demandoj gravas):

"Internacia lingvo estas kompreneble bezonata (sur la "kontinento" de la reto) kie plimultiĝas internaciaj kontaktoj. Tial ni ne rajtas neglekti

*Sekvo, p. 3*

# INTERVJUO KUN ZDRAVKA METZ

**1. ESK eldonis vian libron "Bestoj en nia domo". Laŭ la datoj kiujn vi mencias fine de ĉiu rakonto, sajnas ke vi komencis ilin antaŭ 18 jaroj.**

Jes, vi pravas. Antaŭ tiom da jaroj mi alvenis Kebekion kaj mi ne parolis la francan. Priskribi miajn impresojn, ja estis la maniero esprimi min. Tiutempe ankaŭ mi daŭre havis kontakton kun zagreba radioelsendo por infanoj kaj mi preparis du temojn kanadajn pri acersiropo kaj pri indianoj. Do tiu unua rakonto iel ankaŭ celis infanan publikon. Kiam oni rakontas al infanoj, mia deziro estis kaj daŭre restas informi ilin pri vero instrucele.

**2. Antaŭ 18 jaroj, ĉu ESK ekzistis?**

Kiam Normando kaj mi venis Kebekion ekzistis KEA kaj ĝia jara renkontiĝo. la kongreso de KEA ne sufiĉis al ni por daŭre havi kontaktojn kun esperantistoj. Tiam mi loĝis en Granby kie ne estis iu alia E-isto. Ni kontaktis grupon en Ŝerbruko kiu tiutempe estis tre aktiva. Jam monaton poste ni translokiĝis en arbaro, pro laboro, do ni komencis pensi pri organizo de iu provinca asocio, ĉar ni estis iom for de du aktivaj grupoj (ŜES kaj MEK). Kun granda subteno de Petro Collinge, kiu instruis Esperanton kadre de kurso pri lingvistiko ĉe ŝerbruka universitato, ni invitis esperantistojn al Saint-Michel-des-Saints. Ĝi estas vilaĝo apud arbaro kie ni loĝis kaj ni organizis kunvenon dum la semajnfino 3-4-5 de septembro 1982, kiun partoprenis trideko de esperantistoj kaj fondis ESK-on. Normando estis nomita la prezidanto kaj mi sekretariino-kasistino.

**3. Do vi bone konas historion de ESK. Ĉu vi povas ion rakonti pri aktivecoj kiujn ESK organizis?**

Veninte en Montrealo en la aŭtuno, ni povis ĉeesti monatajn kunvenojn de Montreala E-klubo. Por Normando kaj mi tio ne sufiĉis kaj ni provis organizi pli oftajn renkontiĝojn – en Europo tio estas normale renkontiĝi unufoje semajne. Krome Normando gvidis E-kurson en la Botanika Ĝardeno, ĉar tie ni havis ankaŭ MEK-kunvenoj – estis senpaga la loko. Kiam ni translokiĝis en nian domon, ni donis nian kelon je dispono por Esperanto. Ankaŭ nun tie okazas E-kunvenojn, ĉi tie troviĝas Libro-Servo de KEA, ankaŭ telenona respondilo kies numero estas enskribita en telefona libro kaj E-kursoj laŭbezone. Kaj pri aktivecoj – krom la kursoj, ni organizis jarajn renkontiĝojn de ESK, lokajn renkontiĝojn kun esperantistoj el Otavo, Ŝerbuko, somerajn ESK-renkontiĝojn ĉe lago Magog, skiadon. Krome ni provis partopreni pacan

*Sekvo, p. 4*

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2000.06.15**

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury kaj Zdravka Metz. Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président/vicprezidanto), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario), Zdravka Metz (trésorière/kasistino), kaj Yvon Roux.

Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G 2R8
Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151
LaRiverego@esperanto.nu
http://www3.sympatico.ca/esperanto

# Sekvo: Ek al la ret'!

*Suite de l'article de la première page, dans lequel l'auteur s'interroge sur l'impact d'Internet sur les associations locales d'espéranto.*

la novan kontinenton, kien ĉiutage migras miloj da homoj sen antaŭa sperto pri regula interrilatado kun alilingvanoj. Interreto bezonas Esperanton, kaj Esperanto bezonas Interreton. Tamen ne nur preskaŭ ĉiuj esperantistoj en evolulandoj, sed eĉ la plimulto de niaj samlingvanoj en la plej riĉaj partoj de la mondo daŭre restas ekster la nova kontinento - malgraŭ ke ĉiam pli granda parto de nia komunikado okazas per retpoŝto, kaj kelkfoje aktualaj informoj pri aranĝoj kaj renkontiĝoj haveblas nur per la reto. Necesas ke la reta generacio ne izoliĝu: ĝi ne rajtas forgesi tiujn al kiuj mankas la bileto al la nova kontinento. Sed ankaŭ indas ke spertaj movadanoj kiuj ĝis nun restas ekster la retaj diskutforumoj, konsideru ĉu ilia sperto ne povus utili ankaŭ en la nova medio."

Kaj teme pri la graveco ne forgesi la eksterretulojn, ni devas memori, ke neniam io anstataŭos la korpajn renkontiĝojn, la senperajn kontaktojn... nur per tiuj okazaĵoj ĉirkaŭ niaj lokaj asocioj povas ni havi fortan senton de la utilo kaj de la uzebleco de nia komuna lingvo.

Due. La ĉefa oficiala celo de ESK ĉiam estis la disvastigo de Esperanto en Kebekio. Jes, la Societo laboris por havebligi informojn pri la lingvo surrete, sed restas problemo. Por ke la retuloj iru vidi nian paĝaron, ili unue devas interesiĝi pri Esperanto. Tial la homoj - membroj kaj estraranoj de ESK - devas daŭrigi sian agadon, multobligi la publikadon de informilojn, trovi monon por pretigi budojn en ekspozicioj kaj organizi okazaĵojn partopreneblaj de neesperantistoj. Neniun el tiuj celoj povus atingi nur unu aŭ du samideanoj laborante ĉe paĝaro. Fakte, nur ESK kiel ĝi nun ekzistas povas serioze plenumi tiujn taskojn.

Trie. Pri la malkresko de la membraro. Antaŭ kelkaj jaroj, la membrolisto de ESK atingis preskaŭ ducent membrojn, sed ĝi nuntempe daŭre ĉirkaŭas okdek membrojn. Tiufoje, mi parolos persone: mi kredas, ke ne gravas la nombro de membroj. Nur gravas la plenumado de nia celo, kiu estas disvastigo de Esperanto, ne kreskigo de nia membrolisto.

> Por ke la retuloj iru vidi nian paĝaron, ili unue devas interesiĝi pri Esperanto. Tial ESK devas daŭrigi sian agadon.

La fakto ke nur okdek personoj daŭre kotizas al la Societo tute ne signifas, ke nur okdek kebekianoj scipovas la lingvon. Nur signifas tion: ke nur okdek personoj interesiĝas pri la aktivaĵoj. Kaj? Ĉu indas ĉesi informi la kebekianojn pri Esperanto kaj organizi aktivaĵojn por la aktivaj samideanoj de Kebekio? Mi sincere kredas, ke la respondo devas esti "ne". Vi, membroj, estas nia forto kaj nur vi, kotizante, permesas al ni agadi por Esperanto.

Pro tiuj grandaj kialoj, la estraro de ESK decidis daŭrigi ĝian aktualan agadon. Nun povas ni esperi, ke ni povos prizorgi niajn celojn.

## Pri la paĝaro!

Nun, pri la paĝaro: la ESK nun proponas al la retuloj pli kompletan paĝaron. Franclingva kaj anglalingva sekcioj proponas al la neesperantistoj tri temojn: malkovri Esperanton, vivi Esperanton kaj malkovri Esperanton en Kebekio.

En la unua sekcio, la neesperantistoj povas informiĝi pri la historio, la celoj aŭ eblecoj de Esperanto. En la parto "Vivi Esperanton", ili povas lerni kiel skribi, vojaĝi, renkonti, rete babili en la Lingvo Internacia, ekzemple. Fine, ili povas lerni iomete pri la Esperanto-Societo Kebekia.

La parto pretigita por la esperantistoj estas kompreneble iom pli mallonga: nur la sekcio pri Esperanto en Kebekio sufiĉas, kaj ĝi estis pretigita ne nur por la kebekianoj, sed ankaŭ por la eksterlandaj samideanoj, kiuj (eble!) ne konas ESK-on aŭ Kebekion. Oni ankaŭ povas trovi tie ligilojn al la ĉefaj paĝaroj de la reta Esperantujo, aŭ legi partojn de *La Riverego*.

Tiu paĝaro, esperas ni, estos regula rendevuo inter vi kaj ni!

# Sekvo: Intervjuo kun Zdravka Metz

movadon kaj marŝis portante verdan flagon, havis informbudojn dum foiroj por virinoj kaj alia por gejunuloj , organizis prelegojn pri Esperanto kaj kompreneble E-kurso estis ĉiama aktiveco.En 1987 – pri E-jubileo sciis ĉiuj busuzantoj ĉar dum tiu jaro 900 aŭtobusoj prezentis informon pri Esperanto.

**4. Kion ŝanĝis alveno de viaj du infanoj?**

Kompreneble mi havis malpli da tempo kaj mi retiriĝis de estraro. Tamen mi daŭre subtenis, kunorganizis, partoprenis ĉiun E-eventon kompreneble kun infanoj, ĉar ankaŭ ili ja komprenis kaj poste parolis la lingvon. Nia adreso troviĝas en Pasporta Servo – do, ni havis multajn vizitantojn kaj ni mem regule vojaĝis eŭropen. Ni partoprenis UK-kaj IJK-on en Kubo kaj tiam ekis la ideo organizi IJK-on en Montrealo kio estis realigita en 1992.

**5.IJK en Montrealo – menciante la kongreson multaj kun ĝojo pensas pri la kongreso – kaj vi?**

Tiun semajnon ni preparis dum du jaroj. Estis multaj belaj kaj interesaj ideoj kiujn ni ja sukcesis realigi kun iom pli ol 100 partoprenantoj de ĉiuj kontinentoj. Mi nepre menciu ankaŭ donacemon de esperantistoj en Kebekio kaj Kanado per kies monsumoj ni povis gastigi duonpage dekoj de gejunuloj de nepagipovaj landoj. Dum tiu kongreso, kvankam ĝi okazis en somero, ni povis krome prezenti dum kebekia vespero la acersezonon havante eĉ la neĝon. Artikolo en taga ĵurnalo informis germanan konsulon pri IJK kiu iam estis aktiva esperantisto kaj alportis al ni ĉampanon. Ni travivis tagon kaj nokton kun Indianoj en tipioj kaj longa domo, gejunuloj povis senpage bicikli tra Montrealo, kaj fine ni fermis kongreson festante mian naskiĝtagon - ĉu ne memorinda kongeso por mi. Kompreneble, ĝi ja estis semajno plena de respondecoj kaj kalkuloj por mi - mi estis kasistino de IJK, profiton grandan ni ne faris por TEJO, sed pluraj gardas "riĉajn" memorojn... Pri kongreso ni faris videobendon kaj ĝi estas amuza kaj sukcesa dokumento.

**6. Ĉu ESK organizas iun regulan renkontiĝon?**

Jes, ĝi subtenas monatajn kunvenojn pri kio informas *La Riverego*. ESK ankaŭ kunorganizas OKEMO-n kiu okazas meze de oktobro en Vermonto (Usono). Jam pasis ses tiaj uson-kanadaj renkontiĝoj kiuj ja estas certa stimulo por personoj kiuj volas praktiki la lingvon.

**7. Kaj nun kien direktiĝas ESK?**

Eble tiun demandon estus pli bone starigi al la prezidanto. Tamen estante denove en la estraro kaj denove kasistino mi ĉeestas estrarkunsidoj kaj mi estas ĉe la fonto de informoj. Estas certe ke la ĝenerala vivo ŝanĝiĝis lastajn dek jarojn. Homoj havas komputilojn kaj interrete ili kontaktas kun la mondo. Nuntempe ni aŭ pli bone Jessy LaPointe preparas retpaĝojn pri Esperanto, E-kurson kaj kompreneble ĉiuj eblaj ligoj kun aliaj E-movadoj.

Tiel la homoj povos vidi kaj por tiuj kiuj jam parolas la lingvon, povos uzi, diskuti internacie sen lingva baro. La mondo vere estas eta kaj certe E-to estas bona pasporto por travojaĝi ĝin de sia domo. Kompreneble por tiuj kiuj havas tempon kaj monon, Pasporta Servo atingis pli ol mil adresoj en 140 landoj. Do, bonan vojaĝon ĉu per interreto aŭ aviadilo kaj aliaj transportiloj.

**8. Ni revenu al via libro. Ĉu ĝi vendiĝas kaj kiel ĝi estas akceptita?**

La eldonon de ESK aĉetis Libro-Servo de KEA. Mi zorgas pri LS do mi ja povas respondi. *Bestoj en nia domo* vendiĝas ĉe UEA, en Japanio, Kroatio, Francio.. Mi ja ricevis kelkajn gratulleterojn kiuj certe ĝojigas min, unu nepre menciindas - tiu de Claude Piron.

Eble mi diru ke skribante po unu rakonto post iu evento, mi ne kredis ke mi skribas parteton de iu libro. Mi simple bezonis eligi miajn sentojn por kvazaŭ liberiĝi de ili. Mi nomas ĝin papera terapio kaj ĝi ĉiam helpas al mi por ke mi havu internan pacon.

Mi kore dankas al vi kaj mi nepre diru ke la libro *Bestoj en nia domo* enhavas 15 rakontojn kaj kostas 10 dolarojn plus sendokostoj kaj aĉeteblas ĉe la Libro-Servo de KEA.

## Faites le grand saut!

Bon, vous êtes membre de la SQE, c'est bien. Mais saviez-vous que pour seulement 13$ vous pourriez être membre de l'Association mondiale d'espéranto! Vous deviendriez alors "membro kun gvidlibro". En tant que membre vous recevrez le guide du mouvement espérantiste international, qui contient les informations de base sur le mouvement : les services offerts, la liste des associations nationales, le mouvement jeunesse, etc.

## Saltu pli alten!

Estas bone membri en la loka movado sed certe interese ankaŭ membri en la internacia movado. De kelkaj jaroj, la Universala Esperanto-Asocio ofertas bazan membrecon tiel nomata "membro kun gvidlibro" kontraŭ 13$ kanadaj. Kiel membro de UEA, vi ricevos gvidlibron kiu detale prezentas la internacian movadon: la diversajn servojn (koresponda, pasporta, ktp) la naciajn kaj fakajn asociojn (skolta, komputilista, blindula, biciklista, ktp) kaj multe pli. Se vi interesiĝas aliĝi, ni invitas vin kontakti la kanadan peranton de UEA: Olga Du Temple.

## Diligente dum 14 jaroj!

Nous avons un nouveau rédacteur pour *La Riverego*: Jessy LaPointe. Son prédécesseur Sylvain Auclair, a accompli la tâche durant 14 ans et rédigé 57 numéros. Merci beaucoup Silvano, pour ton dévouement à produire un bulletin de qualité.

Ekde nun la nova redaktoro de La Riverego estos Jessy LaPointe. Mi ŝatus sincere danki al Sylvain Auclair (Silvano) kiu diligente kaj zorgeme okupiĝis pri tio ekde 1986. Jes ja, li redaktoris 57 numerojn de *La Riverego* kaj nun "emeritiĝas" de tiu tasko pro familiaj devoj. Danke al li, nia bulteno alvenis akurate al vi kvarfoje jare. Li ĉiam provis havi ekvilibron en la enhavo, konsiderante la bezonojn de novuloj kaj ankaŭ de spertuloj en la movado. Silvano plu restas kiel vicprezidanto en la estrarano kaj daŭre okupiĝos pri la membraro.

Denove dankegon Silvano: viaj klopodoj estis utilaj por la bonfarto de ESK kaj la 57 *Riveregoj* restos en la arkivoj de nia societo kiel pruvo de via sindediĉo.

Nome de la estraro, Normand Fleury, prezidanto de ESK.

## La *Papago* mortis

Bonvolu noti, ke la Papago ne plu ekzistas. Tiel, ke se vi volas scii pri la Montrealaj renkontiĝoj, bonvolu legi pri tio lastpaĝe de La Riverego. Se vi interesiĝas pretigi aktivaĵojn kadre de la renkontiĝoj, alvoku Ivanon (Yvon Roux), je la (514) 727-8758.

# La reto por ĉiuj

En la lasta buĝeto de la kebekia financministro Bernard Landry, la estraro de la provinco anoncis investon de 121 milionoj da dolaroj por helpi la kebekiajn familiojn aĉeti hejmkomputeron kaj akiri aliron al la reto. Laŭ la dokumento *Pour une famille branchée* (Por enretiĝita familio), tiu nova programo permesos al la familioj enretiĝi kaj aĉeti komputeron por la kvarono de la normala prezo. Kebeko do pagos 75% de la kostoj por la luado de komputero kaj por aliro al la reto dum du jaroj.
Fine de la programo, la partoprenantoj rajtos konservi sian komputeron sen pluaj kostoj. Krom tio, estas menciinda, ke la limkosto por la komputero kaj por la aliro estas je 450$ jare, per familio. (La limkosto por la aliro sole estas 200$ jare, per familio.)
Tiuj kiuj aliros reten inter la 1-a de majo 2000 kaj la 31-a de marto 2001 ricevos monatan rabaton pere de la akreditaj ISP (Liveranto de Interreto-Servo).

# Aŭtuna Renkontiĝo Esperanta en Okemo 2000

*Pri la7-a Internacia Semajnfino Esperantista en Okemo Mountain Resort, Ludlow, Vermonto, Usono, de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro 2000 (Dank-Festo en Kanado, Kolumbo-Festo en Usono).*

En oktobro 2000, okazos denove aŭtuna renkontiĝo en Okemo, Vermonto. Dum la pasintaj jaroj, tiuj kiuj venis vere ĝuis la belegan montargastejon, la amikecan etoson, la internaciecon de la ĉeestantaro kaj la varian programon.

**Kio estas I.S.E.?**

La Internacia Semajnfino Esperantista celas kunigi esperantistojn el nordorienta Ameriko dum tritaga semajnfino. Organizas ĝin la Esperanto-Societo Kebekia lige kun aliaj esperantistaj asocioj kaj kluboj en Usono.

**Programo de I.S.E.**

Komenciĝo je la 14a horo sabate, la 7-a de oktobro.
Finiĝo je la tagmezo lunde, la 9-a de oktobro.
La programo estas plurnivela, kurso por progresantoj kaj diversaj prelegoj por la lertuloj. Estas ankaŭ amuza interkona vespero.
Vi povas ekskursi en la naturo aŭ al apuda Ludlow.
Dimanĉo vespere okazos komuna vespermanĝo. Ĉiuj kunportu ion por dividi kun aliaj.
Sekvos kultura vespero kaj vi estas bonvena prezenti ion.
Se vi intencas partopreni la kursojn aŭ prezenti ion dum la semajnfino, bonvolu informi nin, unu monaton antaŭe kiel ke ni povu finplani la programon.

**Kiu venas?**

Dum la pasintaj I.S.E., 40 ĝis 80 esperantistoj el Ontario, Kebekio,
Nov-Skotio, Nov-Anglio, Nov-Jorkio, el europaj landoj (Britio, Germanio, Svisio) kaj eĉ el Japanio partoprenis entuziasme. La plej juna aĝis 8 kaj la plej aĝa, 80!
Invitu viajn familianojn kaj konatulojn ĉar la gastejo situas en tre bela montara regiono kie ili povos ripozi dum vi esperantumos. Venu ĝui internacian amikan etoson.

**Loĝado por I.S.E.**

*N.B.: Ĉiuj prezoj indikitaj estas en usonaj dolaroj.*

Vi havas du alternativojn por loĝado: loĝi aŭ ĉe Okemo Mountain Resort, kie okazas I.S.E., aŭ en apuda Ludlow.

**Loĝi ĉe Okemo**

Okemo estas belega ski-feriejo. Ĉiu apartamento ĉe Okemo havas plenekipitan kuirejon (vi devas alporti nur manĝaĵon). La apartamentoj ĉe Kettle Brook kaj Winterplace/ Ledgewood ankaŭ havas manĝejojn kaj salonojn kun kamenoj (kun brulligno) kaj televidiloj (kun vidbend-aparatoj). Se vi preferas loĝi ĉi tie, vi povas fari viajn aranĝojn rekte kun Okemo, aŭ vi povas kontakti nin, por ke ni faru gruparanĝojn.

**Kiel mendi?**

Vi povas kontakti la feriejon (anglalingve) por scii la prezojn por apartamentoj ĉe Okemo kaj ricevi informilon.

Telefone: 1-800-78-OKEMO
Retpoŝte: okemo@ludl.tds.net
TTT: http://www.okemo.com/survey.html
(formular-kongrua TTT-legilo bezonata)

**Gruparanĝoj**

Ni faros la aranĝojn je la kiel eble plej malalta kosto. Vi havos tri elektojn (prezoj inkluzivas la krompagon kaj imposton; ĉiu loĝanto devas surloke pagi redoneblan kaŭcion de 20$ por ŝlosilo):
- Vi havos privatan dormĉambron (ĝis 2 homoj). La kosto por 2 noktoj estos ĉirkaŭ 150$ en 3-dormĉambra apartamento.
- Studentoj, senlaboruloj, aŭ iuj, kiuj absolute ne povas pagi lupagon, povas dormi sur faldlito en la salono por 25$ por la du noktoj. Mendu rapide al ni ĉar nur kelkaj lokoj haveblas.

Por gruparanĝoj, kontaktu (Notu ke tio validas ĝis septembro poste ne plu eblas fari gruparanĝon)
Normand Fleury (Esperante, france, angle)
respondilo/faksilo: +1 (514) 272-0151
retpoŝto: esperanto@sympatico.ca

**Loĝi en Ludlow**

Vi havas tri elektojn:
Loĝi en junulargastejo: The Trojan Horse, 15$ nokte, 802-228-5244
THLODGE@aol.com
Loĝi en motelo/hotelo: estas dekoj de gastejoj en Ludlow. La plej malmultekosta, kiun ni povis trovi kostas 60$ nokte. Jen parta listo:

Timber Inn Motel, 802-228-8666
Inn Towne Motel, 800-228-8188
Cavendish Point Hotel, 800-438-7908
Happy Trails Motel, 802-228-8888

Aliaj luservoj:
Okemo Valley Hospitality Association
Ludlow Chamber of Commerce, P.O. Bo 333, Ludlow, VT 05149, Usono
Strictly Rentals, 800-776-5149

**Kotizoj 2000**

Ordinara: 25$ usd
Rabatita: studentoj, senlaboruloj, emeritoj: 10USD

La kotizo estas pageble surloke je via alveno, tamen ne forgesu aliĝi tuj!

**Kiel atingi Okemon?**

Per aŭto

Kiam vi atingos Luldow, petu la vojon por atingi "Okemo Mountain Resort".

Per aviadilo
La plej bona flugaveno estas verŝajne Bradley International Airport en Hartford (Connecticut).
Tie, lueblas aŭtomobilo, kaj oni povas veturi rekte norden laŭ granda ŝoseo al Ludlow. La vojaĝo inter Hartford kaj Ludlow estas proksimume 2,5 horoj.
Ekzistas flugavenoj ankaŭ en Burlington (Vermonto) kaj Albany (Nov-Jorkio).
Tiuj estas malgrandaj, kaj malpli oportunaj.
Por pli da informoj pri aviadila alveno, bonvolu kontakti Vilcjo Harris.

Ne necesas sendi la kotizon antaŭe sed necesas ALIĜI.

Eblas aliĝi faksile je: 1-514-272-0151
kaj ni akceptas ankoraŭ poŝtajn aliĝojn je:

ESK-OKEMO 2000
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal, Québec
Canada, H2G 2R8
Bonvenon al amerika Esperantio!

# IOM EL ĈIE

*Diversaj novaĵoj el la Esperantujo*

## Tiom da libroj!

[Interredaktore] La libroservo de UEA atingis en 1999 sian plej bonan rezulton dum la 90aj jaroj. Ĝiaj vendoj sumiĝis je 316 230 guldenoj (EUR 143 500), kio estis 6% pli ol en 1998. Kompare kun la antaŭa jaro, la vendoj kreskis kaj en la vendejo en Roterdamo kaj en la libroservo dum la universala kongreso en Berlino. La sukcesa vendado en Berlino estis rimarkinda, ĉar la universala kongreso mem estis iom malpli granda ol en Montpeliero.

## Esperantlingva poŝtmarko

[Interredaktore] Brazila Poŝto aperigis plian poŝmarkon kun Esperanto-teksto. Lastjare eldoniĝis kvar poŝtmarkoj kun infandesegnaĵoj omaĝe al la jaro 2000. Sub la nomo "Selando o Futuro" (vortludo inter "afranki" kaj "determini" la estontecon), la serio de 16 poŝtmarkoj prezentas talonojn, kaj unu el ili prezentas sunon, ĉielarkon kaj laŭvorte la esprimon "Vivu 2000!". La ceteraj lingvoj estas la franca, la germana, la ĉina, la hispana, la itala, la angla kaj la portugala, kompreneble.

La E-talono estas ligita al poŝtmarko kun teksto "Século XXI - O renascer de un mundo feliz" (XXIa jarcento, renaskiĝo de feliĉa mondo) kaj infano desegnis gravedulinon, kiu generas terglobon. Bildon pri ĝi oni povas vidi en http://www.esperanto.cc.

Laŭ informoj haveblaj, ricevitaj de la esperantisto Enir Garcia, kiu havas rangan postenon en la Poŝto, ne li tion rekte influis. Verŝajne la uzo de Esperanto estis iniciato de iu en la Arta Departemento de la Poŝto mem, kio estas eĉ pli ĝojiga. Eble estus interese gratuli la iniciaton per korespondaĵo al: Prezidência da ECT, SBN - Quadra 01 - Bloco A - Ed. Sede ECT, Brasília - DF - CEP 70002-900.

## Homamaso vidota!

[Interredaktore] Fine de februaro, jam 778 personoj el 49 landoj estis aliĝintaj al la Flagŝipa Evento de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco (de UNESKO), la 85ª universala kongreso en Tel-Avivo, Israelo (25ª julio-1ª aŭgusto 2000).

Pinte de la statistiko staras Germanio (95), Japanio (79), Francio (59), Israelo (57), Pollando (55), Nederlando (48), Italio (37), Usono (29), Brazilo (26), Rusio (21) Korea Respubliko (18) kaj Svedio (18).

Aliateme: UNESKO decidis al la universala kongreso la rajton esti unu el la "voj-montraj eventoj" de la jaro 2000, "la internacia Jaro de Kulturo de Paco", laŭ tiu organizo.

## Katolika pilgrimo/vojaĝo

[Interredaktore] La Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kongresos en Italio de la 2ª ĝis la 8ª de septembro 2000. La kongreso estos partopreno en la Jubileo, kun pilgrimo/vizito al kelkaj gravaj jubileaj lokoj kaj okazos en Rimini, ĉe la adriatika strando, kun tagaj vojaĝoj al Loreto, Asizo, Gubbio, La Verna kaj Romo.

Petu informojn al c.sarandrea@agora.stm.it.

## Vigla E-radio en Pollando

[Interredaktore] La Leter-Fako de Radio Polonia (radioelsendoj de Pola Radio por eksterlando) anoncis la statistikajn informojn pri leteroj kaj raportoj alvenitaj al la unuopaj redakcioj en 1999. Laŭ la raporto oni povas klare vidi, ke la E-redakcio okupis la unuan lokon en la tutjara statistiko pri la alvenintaj leteroj decide superante ĉiujn ceterajn redakciojn. La E-redakcio ricevis 2308 leterojn... multe pli ol la 795 ricevitaj de la germana redakcio. (Dume, la angla redakcio ricevis 567 leterojn kaj la pola, 271.) Kompreneble, la estroj de Radio Polonia uzas tiujn nombrojn por scii ĉu la diversaj elsendoj estas aŭskultataj...

# Diru... Kio okazos?

**27-a kaj 28-a de majo.** Plonĝo en la ĉinan civilizacion, kun du membroj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. La Chaux-de-Fonds (Svisio).

**27-a de junio ĝis 2-a de julio.** Deka Internacia Esperanto-Kongreso, en Istanbul (Turkio).

**26-a de junio ĝis la 14-a de julio.** Nord-Amerika Somera Esperanto-Kursara (NASK), ĉe la San-Franciska stata universitato (Usono).

**5-a ĝis 9-a de julio.** Kultura Arta Festivalo (KAFE), en Tuluzo (Francio).

**17-a ĝis 23-a de julio.** Kultura Esperanto-Festivalo, Finnlando.

**25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto.** 85a Universala Kongreso en Tel-Avivo (Israelo).

**27-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto.** Internacia Junulara Semajno (Hungario).

**5-a ĝis 12-a de aŭgusto.** 56a Internacia Junulara Kongreso, en Hongkongo (Ĉinio).

**7-a de oktobro.** Internacia Ago-Tago.

**15-a ĝis 21-a de aprilo 2001.** Kvina Tutamerika Kongreso de Esperanto (Meksikio).

**21-a ĝis 28-a de julio.** 86a Universala Kongreso, en Zagrebo (Kroatio).

**Julio 2002.** 87a Universala Kongreso de Esperanto, en Fortaleza (Brazilo)

## Ni organizas

**30-a de aprilo.** Vizito al acerejo kaj farmbieno en Sankta-Bruno (ĉirkaŭ 15$). Nepre antaŭrezervu ĝis la 20a de aprilo. 10h.

**12-a de majo Keglo-ludado,** ĉe 920, rue Saint-Zotique. Nepre anonciĝu semajnon antaŭe. 19h30.

**16-a de junio. Kluba renkontiĝo,** en la montreala Esperanto-Domo. Diversaj ludoj. Komuna latinamerika manĝo. 18h.

**13-a de aŭgusto.** Pikniko en parko La Fontaine. Rendevuo ĉe la enirejo de Théâtre de la Verdure. 17h.

**Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj: (514) 272-0151 aŭ al LaRiverego@esperanto.nu.**

# Nova sekcio: Inter Ni

La estraro de ESK konstatis, ke estas pli kaj pli malfacila renkontiĝi esperantistojn, ĉar multaj havas rendevuplenajn taglibrojn aŭ loĝas for de la Esperanto-Domo en Montrealo. Ni ankaŭ ricevas multajn demandojn de kebekianoj en la regionoj kiuj volas korespondi aŭ renkonti kun samideanoj.
Vi baldaŭ rivevos leteron de ni por scii ĉu vi interesiĝas al la ideo, ke via nomo kaj adreso aŭ retpoŝtadreso aperu en *La Riverego*. Tiel, ni proponas al vi ilon por sciigi aliajn kebekianojn aŭ eksterlandanojn pri via deziro korespondadi aŭ renkonti samideanojn en via regiono.

Vi povas ankaŭ kontakti nin ĉe la retpoŝtadreso: LaRiverego@esperanto.nu aŭ voki nin je la (514) 272-0151.

Ekzemplo:

LAPOINTE, Jessy. (1977) Por korespondado kun gejunuloj, gajulo@hotmail.com.